

CENTRUM EDUKACJI MIĘDZYKULTUROWEJ

33-300 Nowy Sącz, Aleja Wolności 37 F 7

KRS 0000415452, NIP734-351-49-37, REGON 122 535 100, www.cem.info.pl

e-mail: cem.nowysacz@gmail.com tel. + 48 18 4429827, + 48 604 088 620

=====

Nowy Sącz, la 11-an de februaro 2016

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Centra Oficejo de UEA, Estraro de TEJO

Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam, NL

Estimataj kaj Karaj Gesamideanoj,

Preskaux kvar semajnoj ni okupigxis pri interkonsentoj diversflanke, por prepari la aldonitan programon por Festivalo Woodstock en Pollando.

Grandega laboro kaj same granda respondeco pri gxi. Fine – preskaux cxio jam estas programita, se tio dependos de nia flanko. Ni ekzemple ne povas antauxvidi la decidon de Elekta Arta Komisio... Sed niaj programeroj estis priskribitaj post interparoloj kaj skribaj interkonsentoj kun kunlabora teamo de volontuloj. Ni tre gxojas, ke tiom da homoj decides labori kune kun ni.

Aldone mi sendos al vi la liston de engaxigitaj personoj al nia Multgeneracia Vilagxo – ESPERANTO. Tute aparte mi preparis la bugxeton por la arangxo. Ni sxangxis la nomon de Haltejo al Vilagxo, cxar tio donos al ni pli grandan spacon de agado (instalajxoj), kaj plej grave – Haltejo signifas ion por momentan, kaj ni volas tie krei ion konstantan, cikle ripetatan dum multaj jaroj... La iniciatinto de la Festivalo, Jurek Owskiak diras – gxi estos gxis la mondfino, kaj unu tago pli!

ESPERANTO ankaux!

La Organizantoj de la Festivalego jam konfirmis k. akceptis niajn proponojn, kun lauxdo pro nia koncepto pri multgeneracio – ili gxojas, ke ni montras tiom largxan intereson de cxiuj agxo (12 – 89) pri la evento, kaj tio estos lauxdinda ankaux por ili.

Amike, samideane, nome de CEM – Halina Komar